



Interlingvistikaj Kajeroj

Interlingvistika Utopiismo

Aŭtoro: Stojan Ĝuĝev

el: Violin Oljanov (red.). Interlingvistiko Esperantologio. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio. 1985. pp. 19–43.

Antaŭparolo de Federico Gobbo

Per ĉi tiu dokumento oni inaŭguras la sekcion “Dokumentoj” de InKoj, en kiu legantoj povas trovi valorajn atestojn de interlingvistiko kiel scienca fako, diskutveka kaj pensprovoka de almenaŭ unu jarcento. Male al la aliaj publikaĵoj, la Dokumentoj estu publikigitaj originale, tio estas en la lingvo en kiu ili estis skribitaj, ĉi-kaze Esperanto. La elekto de la Dokumentoj, farita de la redakcio, baziĝas je du principoj: unue, la valoro de la dokumentoj mem, kiuj estu legindaj eĉ post multaj jaroj ekde la origina publikado; due, la malfacileco trovi ilin, pro la tempopaso kaj la origina situacio de eldonado. Fakte tre ofte interlingvistoj publikis en malgrandaj – disvastige malriĉaj – kuntekstoj, speciale antaŭ la alveno de la komputika epoko. Interlingvistiko neniam ĝuis facilan periodon vidpunkte de la publikigo kaj disvastigo de la rezultoj, kaj foje okazas revenoj de malnovaj problemoj jam solvitaj pro simpla nesciado de la faka literaturo malfacile alirebla. La redakcio de InKoj volas doni helpon por limigi tiun ĉi problemon, reeldonante interesajn kaj ankoraŭ aktualajn kontribuojn.

En Sovetunio – kaj kunligitaj landoj – oni publikis multajn librojn, eseojn, broŝurojn kaj artikolojn pri interlingvistiko kaj ĝia branĉo esperantologio, aparte pri la supozata ebleco reformi la esperantan lingvostrukturon. La artikolo de Ĝuĝev montras kiel esperantlingvanoj, konante rekte la lingvon en praktiko, ne nur en teorio, scias ke lingva vivo kaj viglo tute malpermesas tuŝi la kernon de la lingvo, ĝian strukturon. Male, interlingvistoj kiuj ne partoprenas la esperantlingvan komunumon ofte falas en tiun ĉi eraron.

Estas interese legi la Ĝuĝevajn argumentojn favore al Esperanto, kiu ne estas perfekta – sed perfekta planlingvo ne eblas. Mi lasu la detalojn al la legado de la teksto; permesu al mi nur substreki la fakton, ke, planado de internacia helplingvo kunligatas al la plej modernaj teknologioj de la epoko, nome sputniko kaj cibernetiko. Tio estas centra punkto, ĉar oni komprenas kial lingvistoj preskaŭ ĉiam seninteresiĝis al la temo, dum dursciencistoj (matematikistoj, fizikistoj, kemiistoj, ktp), teknologoj kaj inĝenieroj foje arde pasiĝas pri planlingvado. La lingvofilozofio malantaŭ la kurteno estas la ekvacio “lingvo egalas al teknologio”.

Tiu ĉi teknologiema lingvofilozofio prezentas severajn limojn – kiuj la dua parto de la artikolo klare montras – ĉar per ĝi oni tute ne konsideras la soci-lingvistikan aspekton de Esperanto, kiu igas ĝin unika fenomeno. Kvankam pasis 25 jaroj ekde la origina publikigado de ĉi artikolo, multaj argumentoj ankoraŭ validas. Por pluĝui la enhavon de la artikolo, mi volas fini tiun ĉi antaŭparolon per prezento de la aŭtoro kaj de liaj interparolantoj, cititaj en la artikolo mem.

Stojan Ĝuĝev (1902–1998) estis bulgaro. Li doktoriĝis en muzikologio en Universitato de Parizo, Sorbono, poste li instruis profesore ĉe la Universitato de Sofio muziksciencojn, speciale etnomuzikologio, pri kio li estas internacie rekonata kiel pioniro. La Universitato de Vieno laŭreis lin per la internacia premio “Johan von Herder”. Tre gravas lia plurflanka aktivado en la Esperantomovado: honora membro de UEA, li prezidantis la Bulgaran Esperantistan Asocion, kies revuon li ĉefredaktoris. Ekde 1970 li eniris la Akademion de Esperanto, kaj vicprezidantis en la jaroj 1979–86. Krome, li membris la Akademion Internacian de la Sciencoj en San Marino kaj prezidantis la Internacian Scienca Akademion “Comenius” en Uppsala, Svedujo.

Ĝuĝev mencias kelkajn interlingvistojn, eble ne tro konata al la esperantlingva publiko. Pavloviĉ Istomin (mortis 64-jara en 1971) estis rusa interlingvisto kiu publikis sub la plumnomo Ermar Svadost libron pri la eblo de “universala lingvo” en 1968. E. A. Bokarev estis membro de la Sovetunia Akademio de la Sciencoj, kiu en 1974 redaktis la unuan eldonon de unu el la plej uzataj rusaesperanta vortaroj de la antaŭkomputika epoko (26.000 vortoj, 1974). Alexandru Graur, judo, estis rumana lingvisto doktorita en Sorbono (Parizo), kiu kontribuis ege al la evoluo de rumanistiko. Li subtenis la ideon de internacieco de la scienca vortaro realigita per la paŭso de latinidaj elementoj en ĉiuj lingvoj, kiuj pro tio nature alproksimiĝu. Lia modelo estis la rumana, kies prestiĝa vortotavolo estas latinida – pro tio li kontraŭis la balkanan lingvistikon de Alexandru Rosetti.

Krom interlingvistoj, la aŭtoro mencias gravajn esperantologojn. Émile Grosjean-Maupin, franco, membro de la Lingva Komitato kaj de Akademio de Esperanto, estis unu el la pioniroj de la esperanta vortaristiko. Eugen Wüster, aŭstro, inĝeniero, estas la iniciatoro de la terminologio kiel moderna scienco kaj de esperantologio kiel specifa branĉo de interlingvistiko. Rudolf Haferkorn, germano, inĝeniero, pliprofundigis la laboron de Wüster, aŭtorante fakvortaron de Esperanto pri scienco kaj tekniko, en 1962, okaze de la 75-a datreveno de la lingvo (1887). Li laboris kiel supera poŝtkonsilisto de la germana telekomunika servo. Paul Neergaard, dano, estas la fondinto de plantsepatologio, fako kiun li instruis kiel universitata profesoro en Kopenhago, Beiruto kaj Mysore (Usono). Karl Støp-Bowitz, norvego, multe aktivis por plilarĝigi la vortostokon de la esperanta scienca terminologio, speciale la zoologia, kaj por disvastigi la movadon en Norvegujo.

Kiel atestantoj de la poresperanta movado, la aŭtoro citas du gravajn homojn kiu prenis la heredon de Zamenhof. Edmond Privat estas, kune kun Hector Hodler, la plej grava pioniro de Esperanto post Zamenhof kaj antaŭ Ivo Lapenna, kiu transformis la movadon post la dua mondmilito, ligante ĝin al UN kaj Unesko. Pli informoj pri la pioniroj en Esperanto estas facile alireblaj; malsame oni povas diri pri Olšovanger, kiun Ĝuĝev citas kiel eksterordinara esperanta oratoro, flanke al Privat kaj Lapenna. Immanuel Olšovanger estis

polnaskita judo tre aktiva en la cionisma movado – li fondis studentan rondon nome He-Ĥaver. En la hebrea li tradukis el la malnova itala la Dian Komedion kaj Dekameronon kaj el la sanskrita kaj japana. Krome li kolektis jidajn proverbojn kaj anedoktojn en du volumojn. Li estis honora prezidanto de Hebrea Esperanto-Asocio kaj havis gravan rolon en la Palestina Esperanto-Ligo en la 1930aj, dum la eksperimento de Esperanto kiel paca lingvo por judoj kaj araboj en Palestino.

La novelo citita de Ĝuĝev estas de Rasul Gamzatov, unueta plej fama sovetia verkisto kaj poeto en la rusa kaj avara lingvoj. Krome, la specimeno estas eta provo de literatura traduko.

Pli supraĵe, sed ne malgrave, Ĝuĝev citas la plej famajn sciencistojn kiuj influis la historion de lingvistiko kaj interlingvistikon de la unua duono de la dudeka jarcento. Ferdinand de Saussure estas la iniciatoro de lingvistiko kiel moderna scienco en la dudeka jarcento. Lia frato René, matematikisto, estis eble la plej grava esperantologo de la antaŭmilita mondo. En tiu periodo, Giuseppe Peano, matematikisto, proponis la planlingvon Latino sine Flexione, dum Otto Jespersen, filozofo, lanĉis la planlingvon Novial por konkludi la interlingvistikan krizon aperinta post Ido, la reformo de Esperanto propagandita de Louis Couturat, filozofo konata pro la malkovro de gravaj partoj de la verkaro de Leibniz. Edgard de Wahl estis volapukisto, esperantisto, idisto, antaŭ proponi sian planlingvan projekton Occidental, kiu havis kelkan sukceson ĝis la dua mondmilito. Wilhelm Ostwald, grava kemiisto, estis unu el la plej kunvinkita subtenanto de la ideo pri porscienca internacia lingvo.

Lasta komento: la notoj kun la bibliografio ĉi tie spegulas la manieron indiki referencojn en la originala artikolo. La lingvostilo povas ŝajni nekonvencia kelkpunkte al la nuntempa esperantoparolanto: neniu ŝanĝo estis farita de la redakcio, ĉar ĉi lingvaj trajtoj povas esti interesaj en si mem por interlingvistoj kaj esperantologoj.

Federico Gobbo

Multaj personoj – eĉ interlingvistoj – konsideras Esperanton kiel lingvistikan utopion kaj la esperantistojn – kiel nekorekteblajn utopiulojn. Ekzemple, la sovetia sociologo-interlingvisto Ermar Pavloviĉ Svadost-Istomin skribis en sia antaŭnelonge aperinta libro: “La aŭtoro de la Esperanto-utopio kredis, ke, se oni sufiĉe propagandas Esperanton, ĝi disvastiĝos inter ĉiuj popoloj”.¹ Kaj iom pli supre li nomas Zamenhof “obstina revanto”. Por la momento ni ne bezonas insisti pri la evidenta kontraŭdiro en la aserto de la oponento: unuflanke li nomas Esperanton “utopio” kaj Zamenhof – obstina revanto; sed aliflanke li mem en la sama verko kritikis la “senbazan antaŭjuĝon kontraŭ la artefarita lingvo” (p. 212–235) kaj agnoskas, ke, “pro la feliĉa kunagado de la cirkonstancoj”, el ĉiuj – pli ol 300 — individuaj projektoj de internacia helplingvo, “nur unu – Esperanto – sukcesis akiri certan disvastiĝon kaj uzadon en la tuta mondo” (p. 123); kaj ke la tutpotenca propagando por Interlingua fare de IALA – la plej granda interlingvistika entrepreno de la XX jarcento, posedanta miliarddolaran fonduson – “ne sukcesis en tiu konkurenca batalo forpuŝi la Zamenhofan lingvon, kiu jam kreskigis vastan internacian movadon” (p. 120).

Ĉu efektive povas esti nomata “utopiaĵo” aŭ “ĥimero” rezistpova kaj vivkapabla lingvo, kiu eltenis la konkurecon de pluraj centoj da lingvoprojektoj (el kiuj multaj subtenataj de mondkonataj sciencistoj, aŭtoritatuloj kaj potencaj financaj organizacioj) kaj kiu, laŭ la oponento mem, sukcesis krei vastan internacian movadon kun multaj dekmiloj da